

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

II:a jaro.

Maijo 1897.

N:o 5 (17).

Literatura konkurso 1897.

La societo Espero en la kunveno de 4-a Apr. decidis organizi du internaciajn literaturajn konkursojn en la lingvo Esperanto laŭ la programoj sekvantaj:

I. *Konkurso bel-literatura*, al kiu estos akceptataj:

a) Unu- aŭ duakta peco por malgranda sceno, verkita en la lingvo Esperanto aŭ tradukita el lingvo nacia.

b) Originala verko aŭ traduko sen limigo de temo.

II. *Konkurso scienca kaj teĥnika*.

a) Verko pri la demando de la lingvo internacia aŭ verko leksikologia de la lingvo Esperanto.

b) Originala verko aŭ traduko sen limigo de temo.

La kondiĉoj de la konkursoj estos sekvantaj:

1. Unu verko de ĉiu el ambaŭ konkursoj estos honorita per ora ĵetono kaj diplomo, aliaj nur per diplomoj.

2. La manuskriptoj devas esti sendataj antaŭ 1-a Decembro (novastile) 1897 al la komitatoj juĝantaj (kies personaroj kaj adresoj estos publikitaj aparte) sen nomoj de aŭtoroj; la nomoj kun devizoj devas esti metitaj en fermitaj kovertoj, aldonitaj al la manuskriptoj.

3. El la alsendotaj manuskriptoj la komitatoj elektos nur verkojn, indajn de premio laŭ ilia opinio.

4. Rezultatoj de konkursoj estos publikitaj en la "Lingvo Internacia" 1898. La nomoj de aŭtoroj, kies verkoj ne estos honoritaj, restos nepublikitaj, ĉar la kovertoj kun iliaj devizoj ne estos malfermitaj.

5. La rajto eldoni honoritajn verkojn apartenas al la societo "Espero".



El Francujo.

“Nenion ni legas pri la franca propagando“, povis rimarki niaj amikoj dum la lasta tempo. “Ĉu la fervoro de niaj kunbatalantoj estus malvarmiĝinta?“

Ne, tute ne, karaj samideuloj, sed la tempo mankis absolute por raporti al vi pri nia batalado. Ni eĉ devis interrompi nian ordinaran kunlaboradon en “l’Etranger“ pro la sama kaŭzo.

— Kion do vi faris tiel okupega?

— Diversajn aferojn; sed ni rakontu orde. Kiam Esperanto fortigis sin en Francujo kaj sukcesis en maniero kontentiga dum la jaro 1896, nia provizo da lernolibroj por Francoj estis preskaŭ konsumita, en la komenco de la nuna jaro. Ni vidis kun teruro la armilojn malaperi, precize kiam pli grandnombre venis novaj batalantoj. Ni devis do ĉesigi ĉian alian laboron kaj nur zorgadi pri represigo kaj korektado de nova eldono. Ĝi ne estas plene tia, kiel ni volus. Ni revis enmeti en la novan lernilon la tutan materialon de “Universala Vortaro“ kun ekzemploj detalaj por pli facila formigo de l’ vortoj. Ni eĉ volis doni tute formigitaj la vortojn uzatajn plej ordinare en la ĉiutaga vivo. Tro forte okupata per la devoj de nia pozicio, ni devigis lasi tiun intencon ĝis la kvara aŭ kvina eldono. En la nuna ni sole korektis kelkajn erarojn. Tamen ni tute ŝanĝis la antaŭparolon kaj ĝin anstataŭis per alia multe pli serioza kaj detala. En tiu ĉi ni ekzamenas ĉiamaniere la demandon pri lingvo internacia entute kaj pri Esperanto aparte. Se ni ne trompas nin kaj se ni povas kredi al diversaj juĝoj, ni tie montras sufiĉe bone kaj pruve la necesecon, eblecon kaj rationalecon de nia ideo. Ni ankaŭ vidigas, kiel Esperanto plenumis tute kontentige la postulojn de lingvo internacia, farita laŭ programo ĝusta, praktika, logika kaj vera. En la fino de l’ libreto oni trovos respondojn al diversaj atakoj la plej ordinare faritaj. Ni ankaŭ skribis noton pri la akuzativo por montri, ke ĝia forigo el Esperanto estus ne simpligo sed komplikigo. Ni finas per rimarko, kiun ni rekomendas al la atento de ĉiu amiko de nia kara lingvo, kaj eĉ ankaŭ de ĉiu partiano kaj amanto de organo tutmonda. Tiu rimarko sin ligas kun la noto pri la akuzativo, sed enhavas multe pli da graveco ol ĝi. Mi volas esperi, ke ĝia vereco konvinkos amikojn de lingvo tutmonda, kiuj eraras ankoraŭ en la serĉado de organo, konstruita sur neĝustaj fundamentoj.

Pri la “Manuel“ mi povas ĝojigan novaĵon komuniki al la Esperantistoj. Ĝi estos vendata ĉe unu el la plej grandaj eldonistoj en Parizo, sinjoro H. Le Soudier, 174 B:d St. Germain, kiu montris mem la deziron ĝin vendadi, post unu letero de mi, per kiu mi prezentis al li Esperanton. La fakto estas tiom pli signifa, ke s-ro Le Soudier eldonis Volapükon. Sed pro la rabato, kiun ni devos fari al la librovendistoj, la kosto de l’ verketo necese estis pligrandigita: la “Manuel Complet“ kostos nun 1 fr., kaj 1 fr. 15 c. kun la poŝta transsendo.

Ekster tiu laboro de nova eldono ni devis subteni grandan korespondadon kun novaj adeptoj en Belgujo kaj Alĝerujo. Danke al la semoj disĵetitaj de s-ro Houzeau de Lehai ni komencas progresadi serioze en la unua el tiuj landoj. Dum la lasta tempo nova tre varma amiko de Esperanto, s-ro J. Putsage, tie propagandis nian lingvon kaj altiris adeptojn. Cetere oni povos rimarki, ke ni kalkulas nun abonantojn de nia gazeto en Belgujo. Alĝerujo liveris ankaŭ, ne sole adeptojn, sed apostolojn. S-roj Gard kaj

Verdier presigis en "L'Aïn-Sefra", ĵurnalo de Mostaganem, longan kaj tre lertan artikolon pri nia lingvo. Ili daŭrigas energian propagandon kaj ni ne mirus, se, en proksima tempo, nia lingvo estus tradukita por Araboj.

Tio ĉi alkondukas min paroli pri alia longa, fundamenta kaj belega artikolo de nia konata amiko, ekskapitano Moch. Ĝi estis unue publikigita en la "Revue des Revues" numero de l' 15:a tago de Marto. Poste "l'Indépendance Belge" reprenis kaj la "Mémorial de la librairie française" analizis ĝin. La "Revue de Sociologie" ĝin publikigos ankaŭ kaj eĉ kun detaloj ne donitaj ĝis nun. La efiko de tiu artikolo jam montris sin tre granda, ĉar multaj personoj skribis kaj al s-ro Moch kaj al mi mem por havi la "Manuel" kaj aliajn librojn Esperantajn.

De la klubo fondita en Louhans ni konstante ricevas tre bonajn novaĵojn kaj multe da mendoj. Niaj amikoj memoru, ke la nunaj progresoj tre grandaj en tiu ĉi regiono venas de la fervora apostoleco de fraŭlino Roux. Senlace ŝi semis la bonan semon kaj ŝi vidas nun kun ĝojo la komencon de l' rikolto. Ho! se ĉiuj virinaj Esperantistoj agadus *obstine*, se ili sentime, konstante altirus amikinojn de nia lingvo, kiel pli rapide ni atingus la celon!

En la lasta tempo ni ankaŭ revarmigis la fervoron de kelkaj adeptoj en Kanadujo kaj estas preskaŭ certa, ke baldaŭ komenciĝos tie agitado konstanta por nia lingvo.

En Nova Kaledonio, ni kalkulas nun kelkajn amikojn kaj unu abonanton. Ni ne devas timi propagandi en landoj tre malproksimaj: unue Esperanto ne havas patrujon, estante esence tutmonda; due la sperto montris, ke eksterlanda propagando revenas tre efike en la landon de l' propagandisto.

Se ni parolas aŭ malvole silentas la amikoj estu tute certaj, ke ni fidele laboras por la venko de nia kara lingvo kaj por la fratiĝo de l' homoj. Parizo 14 aprilo 1897.

L. de Beaufront.

Novajoj.

Biblioteko.

Ĉar multaj esperantistoj, kiuj deziras traduki por la "Biblioteko", elektas tre ofte nebonajn kaj neinteresajn verkojn, la redakcio de l' Biblioteko decidis presi nomaron de verkoj, kies tradukon ĝi deziras havi. En la unua fojo la redakcio notis la sekvantajn verkojn el la *rusa* literaturo:

El *Gogol*: Nokto antaŭ Kristnasko, Portreto, Pelto (Ŝinel).

El *Turgenev*: Versaĵoj en prozo, Ekzekuto de Tropman.

El *Dostojevski*: Skizoj el la morta domo, Malpropra edzino kaj la edzo sub la lito, Mastrino.

El *Ŝcedrin*: Poŝehonskaja starina.

El *Korolenko*: Songo de Makar, Jom Kipur, La arbaro bruas, Sen lingvo.

El *Pomjalovski*: Skizoj de "bursa".

El *G. Uspenski*: Kvarono da ĉevalo, Kvitanco.

El *Ĉeĥov*: Rakontoj.

El *Kot-Murlika*: ion el la 1:a tomo.

El *Osnovjanenko*: Pan Ĥaljovski.

La redakcio de l' Biblioteko invitas la esperantistojn de diversaj landoj

sendi al ĝi la nomojn de l' verkoj tradukindaj. Adreso: A. Kofman, Rusujo, Odessa, Neĵinskaja 34.

— Estas dissendata la unua kajero (2 folioj) de l' Biblioteko: ĝi prezentas la komencon de l' granda verko de *H. Heine* "Reisebilder" (Pentraĵoj de vojaĝo). La tradukon faris s-roj Gernet kaj Kofman.

— La sekvantaj kajeroj de la Biblioteko enhavos: originalajn rakontojn de O. Zeidlitz, Edziĝon de Figaro de Beaumarchais, sciencajn artikolojn de P. Milukov pri la slavoĵ k. a.

"Espero."

La nuna administrantaro de la societo "Espero" konsistas el la sekvantaj personoj: *Prezidanto* — *N. Borovko* (Karpovka 20, l. 3); *sekretario* — *K. Ostaneviĉ* (Ĉefa telegrafa kontoro); *kasisto* — *F. Postnikov* (Peterburgskaja Stora, Malij prospekt 55, l. 11); *bibliotekisto* — *N. Sutkovoj* (Anglijskij 25, l. 14).

— La societo "Espero" en kunveno de 4, IV decidis:

a) Sendadi al ĉiu membro de la societo la gazeton "Lingvo Internacia" senpage. Sekve tiuj el la nombro de l' membroj, kiuj abonis la gazeton, pagas kiel membran pagon nur 4 r. 50 k.

b) Por la memoro de la dekjaro de ekzistado de la lingvo Esperanto eldoni informan libron, titolitan "Jarlibro Esperantista, 1897". Tiu ĉi libro estos senpage dissendita al ĉiuj abonantoj de "Lingvo Internacia".

— En sia kunveno de 6, III la societo "Espero" faris la sekvantan decidon:

Ĉar la nombro de l' verkoj, senditaj al la juĝanta komitato de la literatura konkurso 1896, estis tre malgranda kaj ĉar s-ro M. Abesgus estis la sola, honorita per premio — sendi al li, anstataŭ bronza ĵetono, arĝentan ĵetonon de medala formo.

Propagandado.

S-ro Ŝirjaev en Jaroslavl (Rusujo), la konata propagandisto de nia lingvo, skribas al ni:

La 15:an de marto en 6-a horo vesp. en loĝejo de juna kaj varmega amiko de nia afero, P. F. Jaroslavcev, estis aranĝita la unua kunveno de ĉiuj esperantistoj en nia urbo. Tuta nia esperantistaro decidis enportadi ĉiujare po 3 rubloj por la propagandado de nia lingvo en la urbo Jaroslavl kaj en ĝia gubernio. Krom tio la esperantistaro decidis aranĝi librovendejon de esperantaj libroj. De nun la novaj kaj malnovaj amikoj de nia lingvo kunirados ĉiusemajne por legi kune esperantajn librojn, paroli en Esperanto kaj por konatiĝadi kun novaj amikoj de Esperanto. En la unua kunveno, post la interparolado pri la aranĝo de librovendejo, s-ro P. Jaroslavcev deklamis la himnon de esperantistoj "Espero" kaj la "Kanto de Studentoj" el "Liro"; s-ro I. Ŝirjaev (la agente de Esperanto en Jaroslavl) tralegis kelkajn mallongajn artikolojn el "Lingvo Internacia" por pasinta jaro. En la legado de artikoloj en prozo partoprenis ankaŭ s-roj Levin, Ikonnikov, Rabotnov, Oraevski, Druĵinin k. a.

Rilate la propagandadon de Esperanto en nia urbo, ni devas nur diri, ke ĝi en lastaj tagoj kun granda sukceso propagandiĝas inter la junularo — novaj personoj aliĝas al nia afero preskaŭ ĉiutage.

Kapitalo de d:ro Zamenhof.

— En la n:o 4 de nia gazeto estas proponita (de s:ro Gernet), ke la voĉdonado pri la regularo de l' kapitalo estu finita la 1:a de majo 1897. Pro kelkaj kaŭzoj la lastaj voĉoj nur povas esti presitaj en la junia n:o kaj tial ni proponas, ke *estos prokrastita la limtempo ĝis la presado de tiu n:o*. Ĉar ĝis nun ne multaj voĉoj estas alsenditaj kaj preskaŭ ĉiuj nur en la lastaj tagoj, oni povas supozi, ke ankoraŭ venos. Ĝis nun voĉis 11 personoj por n:o 6, 9 por n:o 5, kaj 1 por n:o 2. Ni deziras memori niajn legantojn, nome tiujn, kiuj volus voĉi por n:o 5, ke la Klubo Esperantista en Uppsala jam estas tre ŝarĝita per nia gazeto kaj ke pro tio estus pli bone voĉi por n:o 6.

— Por la kapitalo oferis s:ro K. A. Ĉajko 0,50 rub. Krom tio s:ro N. Smolenski promesis 2 rub.

Nova literaturo.

— Eliris el la presejo la nova vortaro esperanto-sveda, eldonita de l' Klubo esperantista en Uppsala. La nova verko estas prilaborita laŭ Unversala vortaro kaj la ĝisnuna vortaro de B. G. Jonsson (verko n:o 66). Aŭtoro estas s:ro P. Nylén, konita kiel verkanto de l' verko n:o 95. La tekston esperantan tralegis d:ro Zamenhof. La verko enhavas 68 pagojn kaj kostas kr. 0,75. Oni ĝin mendas ĉe Klubo esperantista, Uppsala.

— Eliris kaj estas dissendata la verko n:o 104 *Adresaro de la Esperantistoj. Serio XVII*, enhavanta la adresojn de esperantistoj, kiuj aliĝis de 1—X—1895 ĝis 1—I—1897. Krom tio ĝis libreto enhavas kelkajn sangojn de adresoj kaj nomaron de altirintoj kaj fine nomaron de nia literaturo. Kostas 40 cent.

Publika parolado pri la lingvo Esperanto.

La societo Espero sciigas nin:

12-an Marton de nuna jaro en "Soljanoj gorodok", Peterburgo, membro de societo Espero F. H. Postnikov faris raport-paroladon antaŭ Pedagogia komitato de Pedagogia muzeo pri lingvo internacia entute kaj pri lingvo Esperanto aparte. En tiu-ĉi kunsido alestis ĉirkaŭ 70 personoj; eniro estis senpaga. S-ro raportinto komence donis difinon de lingvo internacia, montris kaŭzojn de ĝia bezoneco kaj ĝiajn celojn kaj faris lertan historian prospekton de pasigrafi periodo de artingvo. Transirinte al fonetika formo de lingvo internacia, li donis analizon de Volapük kaj montris kaŭzojn de ĝiaj malsukceso. Lasta kaj plej grava parto de raporto parolis pri Esperanto. Tiu-ĉi parto estis ilustrita kun helpo de granda magia lanterno kaj oni montris al publiko bonege faritajn portretojn de s-roj Šlejer, aŭtoro de Volapük, V. Rozenberger, prezidanto de Akademio Volapüka. L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto kaj alilandaj estroj de Esperantismo: W. Trompeter, L. de Beaufront kaj V. Langlet. Post raportlegado estis disputado, en kiu partoprenis ankaŭ publiko. Redirintoj el nombro de komitato parolis pri neebleco esprimi en artingvo ĉiujn nuancojn de penso, pro tio, ke s-ro Max Müller neigas eblecon de tiela lingvo(??*) kaj pro tiuj danĝeroj, kiujn ĝi povas alporti kun si, ekzemple: malfaltigo de homa penso(?)? Kontraŭ tiuj-ĉi rediroj parolis s-roj F. Postnikov, F. Kanaloŝi-Lefler, N. Borovko kaj unu nekonata persono el nombro de pu-

*) Rigardu: "Scienco pri lingvo" de Max Müller.

bliko. Rezumante disputadon, prezidanto de kunsido diris, ke oni devas konfesi praktikan signifon de Esperanto. Al membroj de komitato estis disdonitaj per s-ro F. Postnikov "Mallongaj sciigoj pri E.", kaj kelkaj ekzempleroj de "Universala vortaro", de "Kain" kaj de "Fantomoj". Kelkaj personoj el publiko esprimis deziron ellerni lingvon kaj petis ĉe alestintaj esperantistoj iajn informojn.

Espero.

* * *

British Museum en London, petis de la Klubo esperantista en Uppsala ricevi por sia "Department of printed books" unu ekzempleron de nia gazeto; kompreneble kun plezuro estas plenumita la peto.

Pri Esperanto parolis: En la N:o 9 de l' gazeto "Ciklist", eldonata en Moskvo, sin trovas kelkaj linioj pri nia lingvo: oni konsentas, ke la velocipedistoj tre bezonas lingvon internacian kaj... oni rekomendas al ili lingvon hispanan! La gazeton al ni sendis s-ro *Cvetkov*. — En la N:o 76 de "Odesskaja Gazeta" sin trovas kelkaj linioj pri nia gazeto. — En la N:o 10 de l' gazeto "Jalta", kiun al ni sendis d-ro *Ostrocski*, estas presita raporto pri la parolado de s-ro *Postnikov* pri lingvo internacia. — Kelkaj linioj pri nia lingvo estis ankaŭ presitaj en la N:o 70 de la gazeto "Krim". — En la N:o 15 de l' ĉiumonata gazeto "La Suisse Universitaire" sin trovas invito al la legantoj turni la atenton al nia lingvo kaj vastigi ĝin inter siaj konatoj. La invito estas subskribita: *M. S. Bogdanov*. — Pri la parolado de s-ro *F. Postnikov* en Soljanoj Gorodok en S.-Peterburg raportis multaj gazetoj de S.-Peterburg, interalie "Novosti" (Novaĵoj) en la N:o de III, 26, "Peterburgskaja Gazeta" (Gazeto de Peterburg) en N:o 70 de III, 25, "Novoje Vremja" (Nova Tempo) k. a.

En *Wasabladet*, gazeto en sveda lingvo eldonata en Wasa (Finlandujo) estas presita (en N:o 41, de 6a aprilo 1897) artikolo titolita "Esperanto, korespondenca kaj turista lingvo" (el broŝuro eldonita de l' klubo Esperantista en Uppsala). La artikolo enhavas la 10 unuajn paĝojn de nia broŝuro (verko 91) kune kun sciigo, ke tiu sama broŝuro post mallonge estos vendata en la librejo de *K. Montin*, Wasa. — Kompreneble ni ne bezonas atentigi niajn legantojn je la grava signifo de tielaj raportoj en la gazetoj, sed ni volas memori pri la nova maniero de propagando, kiu komenciĝis per tiu artikolo. Ni kore petas ĉiujn niajn abonantoj, en Svedujo kaj eksterlande, ke ili volu transdoni, ĉiu en sia urbo, ekzemplerojn de la nomita broŝuro (kaj konformaj en aliaj lingvoj) al la red. de la gazetoj kune kun peto presi parton de ĝi. Tiel oni ankaŭ igos librovendistojn, ke ili vendu esperantajn librojn.

N:o 5 (1 marto 1897) de *Gazeta Handlowo-Geograficzna*, organo de l' Societo pola por komerco kaj geografio en Lemberg (Lwow), Galicien, Aŭstrujo, enhavas artikolon sufiĉe longan pri nia lingvo. La artikolo, kiu enhavas interalie la leteron de Cl. Adelsköld (el la sveda broŝuro N:o 91) en pola traduko, sciigoj pri nia kreskanta literaturo k. c. estas skribita de s-ro A. B. Brzostowski, nia laborema amiko en Lemberg. Post la artikolo estas presitaj 6 pecetoj en esperanta teksto, nome: 1. Patro nia. 2. El la Biblio. 3. La komenco de la "Himno". 4. "Ho, mia kor"! 5. Letero komerca. 6. Cirkulero — ĉio kun rimarkoj pri la elparolo k. c.

N:o 7 de l' sama gazeto enhavas artikolon titolitan *Kronika Esperantyczna* de l' sama aŭtoro, en kiu artikolo oni legas pri la Biblioteko de la lingvo Esperanto, pri la Kondukanto (verko n:o 37) kaj pri la Preĝareto por katolikoj. Krom tio la aŭtoro donas utilajn adresojn por personoj kiuj volas lerni nian lingvon kaj sciigojn pri maniero, en kiu oni povas ricevi librojn k. c.; ŝajne la artikolo devas esti tre utila por nia lingvo.

S-ro *Gaston Moch* alsendis al ni broŝuron "La langue internationale Esperanto" (12 paĝoj granda 8:o), kiu prezentas elpresadon el la konata *Revue des Revues* N:o 8 de 15a marto 1897. Al la enhavo de tiu interesanta kaj tre grava artikolo, kiu estas presita ne nur en R. de R., sed ankaŭ en la *Supplement littéraire de L'Indépendance belge*, n:o de 21 kaj 28 marto 1897, ni revenos aliffoje.

La *Mémorial de la librairie française* eldonata de l' librejo *Le Soudier*, donis la saman artikolon en mallongigata formo — ne seninteresa fakto, kiam oni scias, ke *Le Soudier* siatempe eldonis la volapükajn verkojn de Kerkhoffs. S-ro *Le Soudier* petis de s-ro de *Beaufront* fariĝi maklera vendisto de lernolibroj por francoj.

S-ro G. Moch ankaŭ verkis artikolon pri nia lingvo por la *Revue de Sociologie*, kiu artikolo baldaŭ estos presita. Estus feliĉe se nia lingvo posedus multajn amikojn, tiel varme kaj konvinke batalantaj kiel s-ro Gaston Moch.

L'Etranger. n:o 5 (aprilo 1897) enhavas sur la unua paĝo tre simpatian nekrologon pri *Jozef Wasniewski*, skribita de l' korespondanto Varsovia de l' gazeto. — Sub la rubriko "Correspondance internationale" oni legas interalie leteron el *Louhans*, de s-ro G. Chavet, estro de l' tiea klubo esperantista, en kiu letero s-ro Chavet proponas ke *L'Etranger* havu du eldonojn, unu francan kaj unu *esperantan* por povi plej bone atingi sian propran celon kaj samtempe labori por disvastigado de nia lingvo. — Inter la novaj membroj de I. C. (n:o 60—85) oni vidas ne malpli ol dek personoj konantaj la lingvon Esperanto kaj unu kiu diras ke li volontonte lernos.



Al memoro de J. Wasniewski.

Vi venis fremdulo el land' malproksima,	Ho, ofte ekfrapis per ĝojo la koro,
— Ĉar larĝa la mar' min disigis de vi —	Veninte de Vi ia kara leter' ;
Sed am' esperanta, senfunda, sentima	Sed nun — ho! el ĝojo fariĝis doloro,
Vin faris konatan kaj karan al mi.	La prunton al Vi jam reprenis la ter'.
Vi lingvon parolis al mi nekonatan,	"Tro frue!" sopiris la koro malĝoje,
Ne estis konata la sveda al Vi —	— Ĉar multon kun Vi ja ekperdis la kor' —
Sed havis ni ambaŭ la lingvon amatan;	Ni havus laborojn por Vi multefoje,
La esperantistoj koniĝas per ĝi.	Sed — Dio bonega ekvokis Vin for.
Neniam ekvidis Vin mia okulo,	Benite Vi dormu do, pola amiko,
Kaj voĉon la Vian ne aŭdis orel' ;	Post tago labora ripozas Vi nun.
Vi tamen por koro ne estis fremdulo	Falĉata ja estas matura tritiko,
Sed <i>frato</i> per alta fratec' de ĉiel'.	Sed super la kampo radias la sun'.

Otto Zeidlitz.



La kanto de l' birdo.

(El sveda lingvo.)

Sonoris birdo en la tili',	Bluokulata anĝel' de Di',
en la tili:	anĝel' de Di',
"Malgranda birdo ja estas mi,	El nub' aŭskultis, kaj kantis li
Sed povas kanti kaj ludi.	Dolĉege en la vespero:
Forestas de mi l' amik' de l' kor',	"Birdeto kara en la tili',
l' amik' de l' kor'.	en la tili'.
Al bosk' kaj monto li flugis for	Amikon vian redonu Di'
Flugadas nun en arbaro."	Pro via kanto kaj ludo."

La birdo kantas en tago ĉi,
en tago ĉi.

L' amik' ĉu venis ne scias mi,
Ne scias tion l' angelo.

Trad. Karl Wijkström.



Aldono al la artikolo "Granda manko"

en la N:o 10—11 de L. I. 1896.

La pensoj, kiujn esprimis s-ro Devjatnin en lia artikolo "Granda manko" estas tute aprobindaj, kaj nun mi nur volas turni la atenton de esperantistoj al unu cirkonstanco, kiu ŝajnas al mi ne tute malgrava en la afero de kritikado en nia lingvo.

La grandega plimulto (se eĉ ne preskaŭ ĉiuj) da esperantistoj uzadas nian lingvon preskaŭ escepte nur per helpo de *plumo* kaj de *okuloj*, kaj ne per *buŝo* kaj *oreloj*; dume en la efektiva vivo la plimulto da homoj uzas ordinare la lingvon ĉefe per helpo de *lango* kaj *orelo*. La lingvo do, kiu danke al iaj ajn kaŭzoj disvolviĝas ĉiam ne en viva parolado, sed escepte nur en skribado, — povas sin montri ne tute oportuna por la uzado buŝa, aparte en la okazo de interparolado rapida. Se mia penso estas prava, tiam ni, Esperantistoj devas ankaŭ zorgi pri la alkitimigado de nia orelo al la sonoj de esperanta lingvo kaj kune kun tio-ĉi pri la perfektigado de lingvo de la flanko de ĝia elparolebleco. Sed oni povas tion-ĉi fari nur *parolante* en Esperanto buŝe; tiam *la orelo* mem komencos sian propran *estetikan* laboradon, forpelante iom-post-iom el la lingvo la sonojn neoportunajn por la auskultado, — kaj la *lango* komencos la laboradon, se oni povas tiel diri, *teĥnikan*, elpelante la sonojn malfacile prononcatajn. Ni memoru nur, ke tiu-ĉi grava kaj longa laboro povas esti plenumata nur tiam, kiam la esperantistoj uzos la lingvon nepre buŝe, kaj ju pli ofte kaj multe, des pli bone; ni memoru ankaŭ, ke tiu-ĉi perfektigado de lingvo fariĝos preskaŭ ekster nia konscio.

Oni povas rediri, ke la parolado buŝa estas atingebla nur tie, kie estas ia societo, ia klubo aŭ almenaŭ ia rondeto esperantista, ĉar oni povas paroli nur kun iu. La simila rediro estas prava nur ĝis certa grado, ĉar por la parolado tute sufiĉe estas havi eĉ nur unu kunparolanton, kaj se ne ekzistas eĉ tiu-ĉi unu, oni povas lin anstataŭi per ia libro aŭ gazeto legante ĝin laŭte. Tiu-ĉi okupado estos utila ne sole por la lingvo, sed ankaŭ por la esperantisto mem.

En la dirita mi devas nur korekti unu vorton: mi nome parolis pri la iompostioma elpelado el nia lingvo de la *sonoj*, neoportunaj por la elparolado kaj aŭskultado, — sed pli vere estus ilin nomi ne "sonoj", sed "kunsonaĵoj" t. e. kelkaj formoj de vortoj, malprospere konstruitaj, — ĉar la sonoj ja estas la unuaj, ĉiamaj elementoj de la lingvo, kaj oni ne povas ilin ŝanĝi, ne ŝanĝante la saman lingvon, sed la kunsonaĵoj dependas en multaj okazoj de ni mem, de nia sciado kaj gusto.

Kage.



Improvizado.

El *Lermontov*.

En mond' antikva tri gracioj estis,
Naskiĝis vi... kaj tamen tri nur restis.

A. A.



Skizoj gramatikaj.

V. Provo analizi la prefiksojn *de, el, dis, for, sen, mal, ne*.

La prefikso *dé* en la fr. lingvo donas al la vortoj, kun kiuj ĝi kunligiĝas kelke da signifoj. La plej ĉefa estas: *kontraŭago je io, kion esprimas la radiko*; ekz. *balle* (pakajo) donas la verbojn *emballer* (paki aŭ enpaki) kaj *deballer* (depaki aŭ malpaki). De la sama naturo estas la verboj: *décomposer* (dismeti), *déplaire* (malplaĉi), *débotter* (demeti de piedoj la botojn), *déloyal* (malhonesta), *dé fiance* (malkonfido) k. c. En la verboj *déboursier* (elmeti monon el burso, pagi), *débrider* (forpreni bridilon), *décharger* (forigi ŝarĝon) oni vidas la duan nuancon de tiu ĉi prefikso, scie — signifon de *forigo, malproksinigo*. Tiu ĉi nuanco estos eble pli klare videbla en la vortoj *détacher* (deligi), *se dériver* (iri de bordo), *départ* (forveturo). La dua signifo kaŝas en si la trian. kiu montras punkton aŭ lokon de komenĉiĝanta ago: *décocher*, elpafi (tiu ĉi verbo estas kunmetita de la pref. *dé* kaj de la subst. *coche* = enfendo, — farata ekz. en arkopafilo por povi pafi, sekve *décocher* signifas litere deenfendi, t. e. ĵeti sagon de la enfendo de arkopafilo), *décrocher* (preni de hoko), *débris* (rompaĵo, rompito de io) k. c.

La pridirata pref. havas en la franca l. ankoraŭ aliajn nuancojn (ekz. signifojn de ŝanĝo, plifortigo k. c.: *décharacteriser* = ŝanĝi la karakteron, *déplacer* = transloki, *déplanter* = transplanti kreskaĵon, *démesuré* = tro granda, *débonnaire* = tre bona), sed ili nun ne povas interesi nin. Mi volas atentigi la legantojn ke la montritaj tri signifoj de la pref. *dé* estas interne kunligitaj kaj venas el la prepozicio "de". La prepozicio *de* ankaŭ montras inter alia lokon de malproksimigo (mi foriris *de* tiu loko; *de* Parizo ĝis Londono). La samon oni vidas en la esprimoj: deturni la kapon (turni la kapon de io), deviŝi (viŝi la ŝviton de la frunto), detiri (tiri trabon de ia loko); en tiuj ĉi verboj la aldonajo *de* ne estas prefikso, ŝanĝanta iliajn signifojn, sed simple signo de loka genitivo kiel same en la fr. vorto *départ* (action de partir, forveturo), *découler* (deflui aŭ flui de); oni vidas, ke en la esperantaj verboj oni povas tute egale meti la vorteton *de* (se ĝi estas prepozicio, t. e. se la objekto de la frazo estas loka genitivo) antaŭ la verbo aŭ post ĝi. Sed se la aldonajo *de* ne estas prepozicio, ĝi tamen ĉiam montras forigon, malproksimigon de ago aŭ stato, kaj se la radiko montras ion pozitivan, la forigo de la pozitiva signifo ordinare transformas la pozitivajojn en negativajojn; tiel la forigo de "ŝarĝi" estas "deŝarĝi".

Tiuj ĉi tri nuancoj de la vorteto *de* trovas sin ankaŭ en la Esperanto; la nuanco de kontraŭo estas videbla en la verboj "dekonsili, debutonumi", la nuanco de forigo, malproksimigo, kaj la signifo de loka genitivo — en la verboj "deiri, deviŝi, deŝiri".

Uzante la diriton por vortformado, ni, en verboj, havantaj antaŭ si la antaŭajojn *de*, devas diferenci almenaŭ du klasojn: 1) verbojn, en kiuj *de* estas prepozicio, ne ŝanĝanta la signifon de l' responda radiko, kaj 2) verbojn, en kiuj *de* estas prefikso, donanta al la radiko nuancon de kontraŭago, de kontraŭstato.

Por doni kelke da ekzemploj por la verboj de la 2-a klaso, ni formos la jenajn: depaki, debandaĝi, deŝarĝi, debarikadi, debutonumi, elpoŝi (elspezi, vidu la rimarkon), debridi, elkasi (elspezi), desigeli, dekapi (senkapigi), decentri (sencentrigi), deĉeni (senĉenigi), deklasi (elklasi, senklasigi: tiu ĉi brahmano

estis deklasita), deklimati (kontraŭ: alklimati), defrizi, dekolori, dekorni (senkornigi), deŝeli, dekroni, detroni, dekrediti (senkreditigi), dehoki, dekondamni (ĉesigi la kondamnon), deanatemii, deferi (forigi feron: deferi kason), defolii (senfoliigi), deformi, deflori (ĉesi flori), deflorigi (ĉesigi flori), degomi, desulki, degradi, debalasti, delogi, delogiĝi, deedzi (senedzigi), demaski, demanteli, demiksi, demembri, demebli, demoraligi, denaciigi, elĉambri, deplumi, depoluri, deposedi (ĉesi posedi), deposedigi, elpoti, devalori, ellieni, deruĝi (ĉesi esti ruĝa), deruĝigi (senruĝigi), derifuĝi, deagordi, dekutimi, dekutimigi, deaprobi, deplenigi (neplenigi), desorĉi, deĉarmi, desterki, deverti, detonori, elosti, deseli, deenteri (elenteri), elvalizi, dedenti k. t. p.

Rimarko. La pref. *el* anstataŭas *de*, se oni volas montri, ke la malproksimigo, forigo fariĝas el *interno*: la kontraŭo de la ideoj “depaki, debalasti, debandaĝi” estas “paki, bandaĝi, balasti”, la signifo de “elpaki, elbalasti, elbandaĝi” estas — preni el io (el interno) pakajon, balaston, bandaĝon; “elpoŝi” signifas preni el la interno de la poŝo; en la verboj “dekondamni, dekutimi” la pref. *de* ne estas anstataŭebla per *el*.

La prefikso *dis* similas je *de* per tio ke ĝi ankaŭ montras forigon, kontraŭon, sed ĝi samtempe diferencas, signifante forigon de *partoj* en diversajn flankojn, malaranĝon de *sistemo*. En la v. detranĉi, dehaki, detiri k. a. pliregas la ideo pri forigo de *unu* parto de la tutaĵo; la v. distranĉi, dishaki, distiri montras ke la tutaĵo estas plene detruita, metita en pecojn, kaj la pecoj metitaj diversflankon. Por klarigi al si tiun ĉi nuancon estas utila fari jenajn verbojn: dissemi (ĵeti ĉiufranken semojn, detruii “amason” da semoj, kiuj antaŭe faris unu tutan aron), dispeli (peli aŭ depeli oni povas unu homon, dispeli en diversajn flankojn — grupon da homoj), disorganismi (malaranĝi sistemon, organison), dissocieti, dispari (meti paron, duon, du objektoj unu de alia), diskunigi, disproporcii, dispensi (kiam la pensoj disŝiriĝas ĉiufланке sen povi centriĝi kaj atenti), disharmonii, disharmoniigi, diselementi. Cetere en kelkaj okazoj, la diferenco inter *d*: kaj *dis* preskaŭ perdiĝas: deformi = disformi, deinfekti = disinfekti.

for diferencas de *de* per tio ke ĝi havas pli da forto; tio ĉi dependas de tio, ke ĝi estas interjekcio: forpeli = peli for, foriru = iru for!

sen. Almetitaj al *substantivo*, esprimanta objekton, *de* kaj *dis* donas verbon de transiranta formo; tia verboj signifas forigi, malaranĝi la respondan objekton; kontraŭe, la pref. *sen* ne havas tiun ĉi econ: ligita al *substantivo*, ĝi ne ŝanĝas la formon de la konstruata verbo: se oni volas anstataŭi *de* per *sen*, la ekvivalentaj formoj ekz. *debandaĝi*, *dekapi*, *deĉeni* estos: *senbandaĝigi*, *senkapiigi*, *senĉenigi*; tio ĉi sekvas el tio, ke *sen* signifas ne *forigo*, sed *manko*, *ĉeso*; tial “senkapi” devus signifi “esti sen kapo”, “senbandaĝi” — “esti sen bandaĝo.” Aldonitaj al *verboj* de *ne-transiranta* formo, “sen” kaj “de” ne ŝanĝas tiun ĉi formon:

flori, dolori, loĝi	ne-transiranta formo
deflori, dedolori, deloĝi	”
senflori, sendolori, senloĝi	”
deflorigi, dedolorigi, deloĝigi	transiranta formo
senflorigi, sendolorigi, senloĝigi	”

Tamen la formoj 1) senflori, sendolori, senloĝi (en senco de: esti sen floro, sen doloro, sen loĝejo), 2) senaboni, senaĉeti, senmanĝi, 3) senbandaĝi, senkapi, senmaski, t. e. kunmetado de la pref. *sen* kun verboj *ne-transirantaj*, *transirantaj* kaj *substantivoj-objektoj* estas *ne-kutimaĵo* por eŭropaj lingvoj, kaj

tial estus bone ne uzi ilin; anstataŭ ili restas la formoj 1) deflori = ĉesi flori (ne-transiranta formo), 2) deaboni = forigi abonon, ĉesigi abonon (transir. f.), 3) debandaĝi = forigi bandaĝon (transir. f.).

Ĉar *sen* montras staton (staton de manko), ĝi pli bone ol la pref. *de* aliĝas al *adjektivigitaj substantivoj*; la formo: senaera, senhara, senlima, sendorma, sendenta, senpaga, senkompata k. c. havas por la kutimo de eŭropanoj pli bonan sonon ol deaera, dehara, delima, des pli ke en la dua formo trovas sin tono de *intenca* forigo, kiun oni povas laŭ bezono tre oportune esprimi per participoj: senlimigita (delimita), senfratigita (defratita), senaerigita (de aerita), ekz.: Kain, mortiginta sian fraton, demandis sin: "kiu min senfratigis?" Daŭre difinaj malsanoj la malsanuloj devas esti senharigitaj k. c.

Rim. Por ligado kun adjektivoj simplaj (riĉa, sana, bona, alta, ruĝa...) *sen* estas ankaŭ neuzata.

mal, ligita al vorto, donas ideon *tute kontraŭan* al la ideo de l' responda radiko; la kunmetita vorto povas havi jesan (positivan) karakteron aŭ nean: bona-malbona, akiri-malakiri, perdi-malperdi (gajni, trovi), suba-malsuba (supra).

ne esprimas neadon de l' ideo, esprimita de l' radiko, kun la nuanco ke la neado ne donas tute kontraŭan signifon: li estas neriĉa (sed ne almo-zisto); malprofito estas perdo, neprofito — nek perdo nek gajno; negranda bastono estas pli malgranda ol bastonego aŭ ol bastono, kaj pli granda ol bastoneto; ne helpi al malfeliĉulo ne estas tiel granda krimo kiel malhelpi al li; malĝentili estas nenobla konduto, ofendi — malnobla.

Rim. La diferenco inter *sen* kaj *ne* estas nur formala. Vidu la rimarkon al "sen".

Paraleloj:

dejugi = forpreni jugon	deloĝi = forlasi loĝejon	deruĝi = ĉesi esti ruĝa
ne jugi = ne surmeti jugon	ne loĝi = ne esti loĝanto	ne ruĝi = havi neruĝan koloron
senjugi = dejugi	senloĝi (formo neuzata)	senruĝi (formo ne uzata)
maljugi = liberigi	malloĝi (formo neuzebla)	malruĝi (f. neuzebla)
disjugi (neoportune, se la vorto rilatas ne al sistemo)	disloĝi (se oni parolas pri kelke da homoj, forlasataj loĝejon por loĝigi diversajn lokojn)	disruĝi (f. neuzebla)
eljugi (kontraŭo: enjugi)	elloĝi = deloĝi	elruĝi (anstataŭaĵo de "ruĝi el", malofte uzata)
deaera spaco (neuzata)	deruĝigi = forpreni ruĝan koloron	
neaera spaco (spaco oksigena, hidrogena aŭ alia)	ne ruĝigi = ne surmeti ruĝan koloron	
senaera spaco (spaco, en kiu mankas aero)	senruĝigi = deruĝigi	
malaera spaco (tia ideo ne ekzistas, ĉar ne estas gaso kontraŭa al aero)	malruĝigi (neebla ideo)	
disaera (neoportuna formo)	disruĝigi (superflua f.)	
elaera (" ")	elruĝigi (" ")	
senviandigi = deviandi	senblankigi = deblankigi	
deviandi = formeti viandon	deblankigi = formeti blankan koloron	
malviandigi = spiritigi (metafore)	malblankigi = nigrigi.	

A. Kofman.



Vivo Internacia.

Tunelo sub Simplon.

Italujo kaj Svisujo faris kontrakton, kiu en la plej mallonga tempo donacos al la homaro novan mirindaĵon de l' teĥniko inĝeniera. Ni parolas pri la projekto de l' tunelo sub Simplon, kiu per sia longeco (19,730 m) superos la plej longajn tunelojn ĝis nun ekzistantajn.

Ea tunelo estos preta post 5 $\frac{1}{2}$ jaroj kaj servos kiel vojo internacia el London, Bruxelles, Paris kaj entute el la centra Eŭropo al Milano, Brindisi, Genua, Napoli kaj al la aliaj urboj ĉemaraj, tra kiuj la poŝto kaj la komercaĵoj iras en la malproksiman Orienton, mallongiginte la nunan vojon je 75 km.

Kiom drinkas la "homo internacia"?

La statistiko montras, ke plej multe oni drinkas en Danujo: ĉiu ano de tiu ĉi lando konsumas meze 8,85 litrojn da alkoholo dum la jaro. El ĉiuj aliaj eŭropanoj sole la norda germano povas konkuri kun la dano; li konsumas ĉiujare 8,25 l. da alkoholo. Poste sekvas Svisujo (5 l.), Holandujo (4,58 l.) Belgujo (4,50), Svedujo (4,15), Francujo (4,08) Badenujo (3,77), Aŭstrujo (3,50), Rusujo (3,40), Finnlando (2,60), Anglujo kaj Würtemberg (po 2,50), Bavarujo (2,45), Portugalujo (2,10), Hispanujo (2,00) kaj Italujo (1,00).

Laŭ tiuj ĉi nombroj kaj laŭ la nombroj de loĝantaro en ĉiu lando estas facile elkalkuli, kiom konsumas dum la jaro "homo internacia" en Eŭropo. La kalkulo proksimuma donas 4,09 litrojn.

La tutmonda ekspozicio en Paris.

Tiu ĉi grandega ekspozicio okupos la placon de 108 hektaroj kaj daŭros de 15-a de aprilo ĝis la 5-a de novembro. La loko por la objektoj elmetaĵaj, la akvo, la gaso kaj la forto meĥanika estos donataj senpage. La sciigoj pri la deziro partopreni en la ekspozicio devas esti alsenditaj ne pli malfrue ol en la fino de l' nuna jaro.

Unu el la mirindaĵoj de tiu ĉi ekspozicio estos grandega teleskopo de 60 m. da longeco. La diametro de l' objektivo estos 1,25 m. Tiu ĉi teleskopo permesos observi la lunon de la interspaco de 100 km.

La redakcio humile petas siajn legantojn alsendadi al ĝi la sciigojn pri tiu ĉi ekspozicio, kiun sendube vizitos tre multaj esperantistoj: kredeble tie kolektiĝos ankaŭ la unua kongreso de esperantistoj por reciproka konatiĝo kaj pripenso de la plej bonaj manieroj propagandi la lingvon.

Nova eldono internacia.

Laŭ la iniciativo de l' kongreso de meteorologistoj en Uppsala en 1894 estis elektita komitato por eldoni rezultatojn de l' observado de nuboj. Nun tiu ĉi eldono estas jam preta. "Atlas international des nuages" (Atlaso internacia de nuboj) estas lukse eldonita libro kun teksto en la lingvoj angla, franca kaj germana, kaj enhavas la priskribon de ĉiu speco de la nun akceptita klasifikacio de nuboj kaj ankaŭ instrukcion por internaciaj observadoj de nuboj. La libro prezentas intereson ne sole por specialistoj.

La 1-an de majo 1897 finiĝas la prova jara limtempo de unutempaj meteorologiaj observadoj de nuboj. Ni ne dubas, ke de nun la unutempaj internaciaj observadoj de nuboj estos regule organizitaj.

* * *

— En S.-Peterburgo formiĝis “*Ligo de reciproka helpo de l’ rusaj verkistoj*”. (Sojuz vzaimopomoŝi russkih pisatelej). Oni povas pensi, ke la apero de tiu ĉi ligo estas nova paŝo al la aliĝo de l’ rusaj literaturaj fortoj al la “ligo internacia por defendo de l’ aŭtoraj rajtoj.” La adreso de l’ rusa ligo estas: *S.-Peterburg. Vladimirskij 21.*

Al la redakcio de “Lingvo Internacia”.

La societo Espero petas la redakcion presi en “Lingvo Internacia” sekvantan:

Ekstra kunveno de la societo “Espero” en Peterburgo de la 13/25 Apr. 97.

Kauze de finiĝo de unua dekjarro de ekzistado de Esperanto, la societo Espero en ekstra kunveno preparoladis meritojn de apartaj personoj rilate Esperanto kaj laŭ la propono de la Komitato alprenis en nombro de honoraj membroj de la societo sekvantajn personojn:

1. *W. H. Trompeter*, pro lia ekstreme oferema, energia, konstanta kaj tre utila praktika agado en Germanujo.

2. *Valdemar Langlet*, prezidanton de la klubo esperantista en Uppsala — pro lia tre energia kaj tre utila por Esperanto praktika agado en Svedujo kaj eksterlande.

3. *L. de Beaufron*, pro lia tre energia kaj tre utila praktika laboro en Francujo.

4. *V. A. Gernet*, pro lia ekstreme energia kaj tre utila por Esperanto praktika agado.

5. *A. S. Kofman*, pro liaj tre gravaj kaj treege utilaj por Esperanto literaturaj laboroj — kiel tradukinto de “*Iliado*”, de “*Kain*” kaj de “*Faŭst*”. Tiuj-ĉi personoj kun *L. M. Zamenhof*, honora membro de la societo de 1892, prezentas nunan honoran membraron de la societo Espero.

Honoraj diplomoj estas senditaj al nomitaj personoj 8 — IV — de 1897.

Prezidanto **N. Borovko**.

Sekretario *K. Ostaniewiĉ*.

Pri la artikolo de s-ro Borovko.*)

Se s-ro Borovko kontentiĝus ekzameni miajn ideojn, kiel mi ekzamenis la liajn, mi nenion al li respondus. Sed, se mi akceptas kaj eĉ deziras sinceran interŝanĝon de ideoj, s-ro B. havas manieron de disputado, kiun mi volas ne juĝi, sed doni al la juĝo de la esperantistaro.

Mi neniam diris ke “oni devas skribi nomojn en Esperanto tiel, ke la alilandaj esperantistoj ne povu tralegi ilin”. — Mi diris kontraŭe: “Ni konservu do por la propraj nomoj la ortografion, kiu estas uzata en la patrujo de ĉiu. Tio ne malhelpos nin skribi poste, inter krampoj, la ortografion plej proksimume fonetikan... sed tio havas sole la valoron de simpla montra rimarko, pli aŭ malpli konforma, sed ne la aŭtoritaton de ortografio, prezentata kiel regulo”.

Mi ne volas pli longe batali. Mi volis simple meti unu apud la alia la sistemon *vere* mian (kiu estas uzata ankaŭ de multaj aliaj esperantistoj), kaj la sistemon

*) Vidu n:on 3, 1897 p. 37.

kiun s-ro B. prezentas kiel mian. En la esprimoj de mia artikolo, mi penis esti kiel eble plej delikata kontraŭ s-ro B., kaj mi esperis la samon por mi — mi vidas ke mi absolute eraris.

R. Lemaire.

De niaj abonantoj.

Du Kritikoj. — En mia disvastigado de l' Esperanto en Francujo, mi tre ofte aŭdis tiun ĉi opinion, ke la lernado de la lingvo internacia, tre facila por la popoloj kiuj parolas latinajn lingvojn (francoj, italoj, hispanoj), malpli facila por la popoloj kiuj parolas germanajn lingvojn (germanoj, angloj k. c.) *estas tre malfacila* por la rusoj kaj svedoj kiuj, krom iliaj patraj lingvoj, scias nenian alian lingvon. Oni diras al mi: La lingvo Esperanto estas facila por la francoj, ĉar ĝi enhavas multegajn vortojn francajn aŭ latinajn. Estas kompreneble, ke tiam franco komprenas senmortare la plej grandan parton inter la vortoj kaj ke la senco de la frazo fariĝas por li facila. Sed, oni diras rilate la rusoj (kiuj scias nur ilian patran lingvon): ili trovas tre malmulte da vortoj, kiujn ili konas en Esperanto. Sekve, la lernado de la lingvo internacia enhavas por ili multe da malfacilaĵoj, kiel alia ia lingvo. La lingvo Esperanto ekzistas do nur por la lingvistoj kaj por la instruituloj kaj scienculoj, fine por tiuj kiuj scias multajn lingvojn. Sekve, ĝi ne povas anstataŭi la nunajn lingvojn. Ĝi ne estas farita por la meze instruitaj homoj; ĝi estas lingvo almetita al la aliaj, ĝi alportas pli grandan laboron kaj ĝi estas senutila.

Mi ne povas diri, ĉu tiu opinio estas vera aŭ malvera. Mi estas franco kaj por mi la lingvo internacia estas mirinde facila, tial mi petas la rusajn kaj svedajn esperantistojn, kiuj volas min helpi en nia propagando, diri al mi iliajn ideojn pri tiu unua kritiko.

Rimarku ke mi min adresas nur al la rusoj kaj svedoj, kiuj *ne* konas la lingvojn francan, latinan kaj germanan, al tiuj kiuj scias nur ilian propran lingvon.

Oni diras ankaŭ al mi tion ĉi: Du homoj kiuj havas malsaman patran lingvon kaj scias nur ĝin, *elparolas tre malsame* la lingvon internacian, tia maniere ili ne povas kompreni unu la alian. Kial? mi demandas. Tial, oni respondas, ĉar tiuj homoj parolas malsaman patran lingvon, iliaj voĉorganoj fariĝis malsamaj. Mi ne estas granda vojaĝanto, mi neniam interparolis esperante kun fremdulo. Sed mi petas la multevojaĝantajn esperantistojn, kiujn interesas la franca disvastigado de nia lingvo, diri al mi kion ili pensas pri tio.

Mi ne volas diri mian opinion pri tiuj du kritikoj, mi lasas al vi, tre estimataj kolegoj, tutan liberecon, ĉar se mi opinias iel, miaj malamikoj dirus ke mi al mi preparas favoran respondon kaj ke mi influas vian opinion.

Estus dezirinde ke la "Lingvo Internacia", nia estimata gazeto, donu lokon en siaj folioj, por respondi al argumentoj kontraŭ nia celo, kaj tiel instruu la esperantistojn-propagandantojn. Mi volus, ke niaj amikoj trovu en sia Ĵurnalo, respondon al seriozaj argumentoj, kiujn oni povas diri kontraŭ nia lingvo. Multe da esperantistoj ne estas grandaj lingvistoj, kaj ili eble haltiĝos en sia disvastigada laboro, se ili trovos argumentojn, al kiuj ili ne povos respondi. Ili povos kredi, ke tiuj kritikoj estas veraj kaj senrespondaj kaj tio influos iliajn ideojn. Nia ĵurnalo devus esti la gazeto de la propagandistoj, en kiu ili trovus tre utilajn konsilojn, modelojn de respondoj al kritikoj. Mi donas ekzemplon. Mi ne povas sufiĉe respondi al la suprediritaj kritikoj. Sekve, mi min adresas al miaj amikoj, mi esperas bonan helpon kaj ke mi ricevos respondojn pri kiuj mi dankos tre kore la estimatajn kolegojn, kiuj estos aŭdintaj favore mian vokon. Ĉiu povas al mi respondi per la "Lingvo Internacia" aŭ per privataj leteroj.

Gabriel Chavet,

Collège de Louhans (Francujo).

Letero al la redakcio de "L. I."

En la lasta tempo preskaŭ en ĉiu numero de "Lingvo Internacia" aperadis diversaj proponoj, havantaj la bonan celon tiel aŭ alie plisukcesigi la vastigon de la lingvo "Esperanto". La plimulto de tiuj ĉi proponoj postulas por ilia efektivigado monajn rimedojn, iafoje ne malgrandajn, sen kiuj ili estas neefektivigeblaj. La aŭtoroj de tiuj ĉi proponoj ordinare sin turnas al la esperantistoj ankaŭ kun la peto oferi laŭforte la monon por la efektivigado de iliaj projektoj. Sed, bedaŭrinde, la esperantistaro estas multe pli riĉa je ideoj, ol je mono, kaj tial la plimulto de iliaj proponoj devas resti senfruktaj. Iafoje aperadas eĉ tiaj projektoj, pri kiuj jam en la komenco oni povas diri preskaŭ senerare, ke ili ne efektivigos. Tamen do ĉiu propono elvokas ordinare kelkajn monajn oferojn, kiuj, havante rektan, klare difinitan celon, ne povas esti uzataj por la efektivigado de ia alia propono, pli plenumebla kaj plenuminda (en nia afero tio ĉi ja estas preskaŭ sinonimoj), kaj devas atendi, kredeble, tre longe la novajn oferojn por tiu sama propono, ĝis la oferita sumo atingos sufiĉan mezuron por la afero. Kaj la tempo pasas kaj pasas, kaj ju pli multe da ĝi trapasas post la publikigo de propono, des pli malmulte da kredebleco restas por kolekti la necesan sumon, ĉar la impresoj de l' propono iom-post-iom malaperas. La ofero do jam estas farita kaj kuŝas kiel malviva kapitalo, — kaj la oferanto jam ne tiel volonte donos novan oferon por la nova, kvankam bonega propono.

Pripensante tion ĉi mi venis al la konkludo, ke estus bone, se la redakcio de L. I. memorigu de tempo al tempo pri tiaj oferoj, kiuj estis donitaj por la proponoj, jam tute perdintaj ial la plenumeblecon, ke ĝi montru tiun el la ekzistantaj projektoj, kiu laŭ ĝia opinio meritas la preferon antaŭ la aliaj, kaj ke ĝi invitu iliajn aŭtorojn kaj ankaŭ oferantojn doni ilian kunsenton al la proponata de ĝi, ĉar pli utila estas unu projekto plenumita, ol dekdu kvankam bonegaj, sed neplenumitaj kaj neplenumotaj.

Ikso.

Informejo de esperantistoj.

Agentoj de la lingvo Esperanto:

11. D-ro fil. *I. Asklöf*, lerneja adjunkto. *Karlskrona*, Svedujo.
12. Librotenanto *Willie Gustafsson*. *Österby bruk, Dannemora*. Svedujo.
13. S-rino *Hilda Cederblad*. *Öfver-Selö*. Svedujo.

Verkoj tradukitaj aŭ tradukataj: *)

24. *Sonoriloj sonas*, de rusa verkisto *P. Zasodimski*, tradukis *I. Ŝirjaev*.
25. *La glora afero*, rusa rakonto, tradukas *I. Ŝirjaev*.
26. *En la vagono*, skizo de l' sveda pseŭdonimo *Ernst Ahlgren*, tradukis *P. Nylén*.
27. *Saludador*, hispana fabelo, tradukis *A. Semenov*.
28. *Kie estas amo, tie Dio*, de *L. N. Tolstoj*, tradukas *Petr Jaroslavcev*.

Korespondadi kun personoj en diversaj landoj deziras la sekvantaj personoj, ĉiuj loĝantaj en *Jaroslavl*, Rusujo:

1. S-ro *Rabotnov*, Pavel Nikolaeviĉ. Rostovskaja ulica, sobstv. dom.
2. S-ro *Levin*, Julij Markoviĉ. Danilovskaja ul. dom Lebedevoj.
3. S-ro *Ikonnikov*, Anatoli Aleksandroviĉ. Voznesenskoje učiliŝĉe.
4. S-ro *Vraevski*, Anatoli Fedoroviĉ. Poŝehonskaja ulica, dom Uŝakovoj.
5. S-ro *Falkoviĉ*, Pavel Aleksandroviĉ. Rojdestvenka, sobstv. dom.
6. S-ro *Luzin*, Dimitri Ivanoviĉ. Semenovskaja ulica, sobstv. dom.
7. S-ro *Drujnin*, Maksimilian Aleksejeviĉ. Rojdestvenka, sobstv. dom.
8. S-ro *Grodusov*, Vasili Lavroviĉ. Spaso-nagorodskaja ul. dom Sokolova.

*) Vidu en n-ro 12. 1896, p. 232.

La gazeton Lingvo Internacia oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- en **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- en **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- en **Hispanujo** ĉe A. Serapio *Santiago*, Hospitalillo 9, (Coruna).
- en **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- en **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon. En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

La societo 'Espero' en S.-Peterburgo.

proponas al esperantistoj de ĉiuj landoj viziti en nuna jaro la ekspozicion en Stockholm, por unua kongreso de esperantistoj. Estus tre dezirinda, ke ĉiu esperantisto skribu sian opinion pri la tempo plej oportuna **por li**, kaj pri temo de preparado.

Por la societo "Espero", kiu sendos Stockholmon sian reprezentanton, la plej oportuna tempo, estas **la monato Aŭgusto**. — Respondojn, oni petas sendi laŭ l' adreso de s-ro Sekretario de la societo: *K. O. Ostanieviĉ. Russie, S. Peterburg, Station télégraphique Centrale.*

Prezidanto **N. Borovko**.

Hjalmar Bäckström,

Luleå, Svedujo

petas Esperantistojn, kiuj deziras viziti Lapplandujon, ke ili persone aŭ letere sin turnu al li. Li donas informojn senpage, sendas kartojn, liveras por la vojaĝo en Lapplandujo akompanantojn, kiuj scias Esperanton. Oni sciigu lin antaŭ la alveno, kaj li liveras loĝejon kaj renkontas apud vaporsipo kaj fervojo. Lia adreso:

Hjalmar Bäckström,

Luleå, Svedujo.

Sinjoro E. Arduin

komercisto en Bordeaux, *11 rue Turenne, Francujo*, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinberco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Kore ni petas la odesajn esperantistojn atente tralegi la sekvantan anoncon:

En lavejo "Ekonomio" de **A. Miropolski** kaj **P. Juzefov**, Odeso, Kolontajevskaja str., domo de Sagomonov, N:o 7/21, oni akceptas por lavado tolaĵon, lanaĵon, silkaĵon de ĉia speco, kaj oni purigas kurtenojn. Laŭ la deziro de l' mendantoj oni liveras la tolaĵon hejmen. *Oni parolas en Esperanto kaj instruas ĝin tie al ĉiuj dezirantoj, senpage.* — Malgrandajn reboniĝojn de l' tolaĵo oni faras senpage.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	Paĝo.
<i>Literatura konkurso 1897</i>	65
<i>El Francujo</i> , de <i>L. de Beaufront</i>	66
<i>Novaĵoj</i>	67
<i>Al memoro de J. Wasniewski</i> , de <i>Otto Zeidlitz</i>	71
<i>La kanto de V birdo</i> , de <i>Karl Wikström</i> (trad.)	71
<i>Aldono al la artikolo "Granda manko"</i> , de <i>Kage</i>	72
<i>Improviso</i> , de <i>A. A.</i> (trad.)	72
<i>Skizoj gramatikaj: V. Provo analizi la prefiksojn de, el, dis, for, sen, mal, ne,</i> — de <i>A. Kofman</i>	73
<i>Vivo internacia</i>	76
<i>Al la redakcio de "Lingvo internacia" de "Espero"</i>	77
<i>Pri la artikolo de s-ro Borovko de R. Lemaire</i>	77
<i>De niaj abonantoj</i>	78
<i>Informejo de Esperantistoj</i>	79
<i>Anoncoj</i>	80